

Тарас Григорьевич Шевченко ,

## Testamento

*tradukita de Ludmila Novikova*

Kiam mortos mi, amikoj,  
Mian tombon faru  
En la stepo larĝe vasta  
De Ukraino kara:  
Por ke vidu mi la valojn,  
Dnepron kaj montetojn,  
Por ke aŭdu, kiel muĝas  
La river' impeta.  
Kiam sangon malamikan  
For de l' ter' Patruja  
Portos ĝi al blua maro,  
Mi ekstaros tuje.  
Lasos ĉion kaj mem Dion  
Mi atingos pie,  
prenos verve ... Sed sen tio  
Mi ne scias Dion!  
Tombon faru kaj ekstaru,  
Ŝiru ĉenon feran,  
Kaj aspergu per tirana  
Sango la liberon!  
Kaj en nova familio,  
Granda, bela, forta,  
Ne forgesu remmemori  
Min per bona vorto!

...

*Traduko de la Rusa poemo “Завещание ” de ТАРАС ГРИГОРЬЕВИЧ ШЕВЧЕНКО (\*1814-02-25 – †1861-02-26) en Esperanton de Ludmila Novikova.*

*Arg-949-1913 (2014-01-03 13:25:33)*

*Tiun ĉi esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la revuo “Moskvaj Novaĵoj”, prov-numero en Esperanto de Aprilo 1989. Pri la tradukinto vidu la retejon “”. La poemo troviĝas en la reto en [http://ru.wikipedia.org/wiki/РЧРѠРŷѡСҚРѠР,,РѡРѡ\\_](http://ru.wikipedia.org/wiki/РЧРѠРŷѡСҚРѠР,,РѡРѡ_) (СФСѠРѡСЖР«СѠРŷР«СГРѡР,,РѡРѡ).*